

Brazilei

jaro 3 n-ro 10 2009

Boris Kolker

Parolo de
spertulo



Leĝopropono

Esperanto en la
lernejojn

Esperanto en la klubo...





Enhavo

Parolo de spertulo d-ro Boris Kolker	06
Esperanto en la lernejoj Ivaldo Alves de Souza	13
Amendo Cristovam Buarque prof. Paulo Nascentes	16
Misuzo de la titolo 'profesoro'	22
Ĉiutaga Esperanto	24
Kiel rapidigi legadon	28
Privata lernejo adoptas Esperanton	30
Nova kursejo	31
Ortografia Interkonsento	34
Konferenco de ILEI	37
Komunikado en EU kaj UEA	42
Karaj geinstruistoj	05
Pliriĉigo vian vortprovizon	25
Enklase	27
Lude kaj Lerne	32
Reteja Mondo	36
Traduko-defio	38

ilei

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliĝinta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)
www.ilei.info

ilei 
www.ileibr.org

Provizora Sekciestro: José Roberto Tenório
Sekretariino: Conceição Rodrigues
Kasisto: Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso
www.ileibr.org
geinstruistoj@ileibr.org
biblioteko@ileibr.org
butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefono: (11) 2055-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: José Roberto Tenório
grafikarango: José Roberto Tenório
kontakto: revuo@ileibr.org
kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues.

Kunlaboris en tiu ĉi numero:

Adriana Pavani, Alberto Flores, Alcyr Guedes,
Aparecida R. Tagliari, Boris Kolker, César
Dorneles, Edson Ponciano, Elmir dos Santos
Lima, Evandro Gouvêa,IVALDO ALVES DE SOUZA,
Jader Rodrigues, Márcia de Castro, Marly
Freitas, Paulo Nascentes, Paulo S. Viana.

Eldiroj

“Gazetoj kaj entute
Esperantio ne sufiĉe atentis,
ke necesas subteni pli
forte tion, kio jam ekzistas
— niakaze la unikan
universitatan programon
— kaj ne ĉiam batali por novaj celoj.”



*D-rino Ilona Koutny, Intervjue al
La Ondo de Esperanto 2009/2*

“Mi memoras, ke
Jozefo HORVÁTH faris
elstaran prelegon dum la
UK de Hungario en 1983.
Bedaŭrinde, mi ne trovas
ie ajn eĉ unu vorton pri tiu brila
kontribuado al nia instruado. Estos
facile, post kiam tiaj informoj aperos,
lasi ilin surrete por ĉiam, tiel kreante
potencan memorlokon de Esperantaj
pedagogiaj informoj kaj antaŭeniraĵoj
kiuj helpas al ni lerni.”



*Denis KEEFE, plede por enretigo de
pedagogiaj materialoj cele al pli
vasta diskonigo kaj uzado
(IPR 09/1, p. 8).*

Surkovrila foto:

d-ro Boris Kolker

Karikaturoj de la internaj kovriloj:

Osmar da Silva Alves

Karikaturoj de la lasta kovrilo:

Eder Benedetti

Karaj Geinstruistoj



Laŭleĝe instruebla

La temo pri instruado de Esperanto en lernejoj pluan fojon spicas la imagemon de enlandaj esperantistoj pro freŝdata amendo-propono prezentita de senatano. Kontribue al la temo kaj espere al daŭrigo de la debato, ni aperigas du artikolojn, unu de Ivaldo Alves de Souza (pp. 13-15) kaj alia de Paulo Nascentes (pp. 16-21). Interesa estas la memorigo fare de Ivaldo, pri tio ke la lingvo estas laŭleĝe instruebla jam de 1996. Kial do la esperantistoj ne sin turnadas al la komunuma lernejo, kiu efektive decidas pri elekto de fremda lingvo-instruado? La respondo estas simpla: esperantistoj ne volas preni sur sin la taskojn, la devigojn, la monelspezojn... Oni supozas, ke, per aprobo de leĝa dekreto, la instruado de Esperanto estos materie kaj teknike subtenata de la registaro. Ĉu revo? Legu mem la artikolon kaj laŭvole kontribuu al la diskutado per sendo de via artikolo aŭ reago-letero.

Kaptu la okazon por ankaŭ ĝui la parolon de la sperta vojaĝestro d-ro Boris Kolker (pp. 6-12); sin prepari por adaptiĝi al la nova ortografio de la portugala lingvo (pp. 34-35); iom pensi pri la misuzo, fare de brazilanoj, de la titolo 'profesoro' (pp. 22-23); k.m.a..

Laste, ni memorigas vin, ke Braziliei partoprenos en la ĉi-jara Brazila Kongreso de Esperanto, okazonta julie en Juiz de Fora. Vizitu nian budon kaj kunvenon. Ĝis tiam!

Esperanto estu regata samnivele kiel la gepatra lingvo!

Plej bona maniero alproprigi al si fremdan lingvon estas kunvivi dum iom da tempo ĉe la parolantoj de la lernata lingvo. Sed vojaĝi ĉirkaŭ la mondo, eĉ per Esperanto, ankoraŭ estas multekoste.

Pensante pri tio, sperta prilingva vojaĝanto, d-ro Boris Kolker, proponas al ĉiuj lernantoj de Esperanto, dezirantaj plibonigi siajn lingvosciojn, tre malmultekostan kaj perfektigan vojaĝon en Esperanto-lando mem, kun jena avantaĝo: oni povas travojaĝi la klerigan itineron virtuale, per la vojaĝagentejo IPKK (legu pliajn detalojn en la intervjuo), aŭ en la komforto de sia domo, per legado de la samnoma gvidlibro. Laŭ informo de nia vojaĝestro, 10 brazilanoj jam akiris klerigan vizon (legu atestojn de kelkaj el ili).

D-ro Boris Kolker tamen estas ne nur sukcesa vojaĝestro en Esperanto-lando, kies gvidlibro-vendo jam superis kvin mil ekzemplerojn, li estas ankaŭ aŭtoro de du popularaj lerniloj por ruslingvanoj: lia baza lernolibro eldoniĝis en pli ol 50 mil ekzempleroj, per eldonejo *Nauka*, kaj lia ekspresa kurso aperis en la fama scienc-populara revuo "Kemio kaj vivo" en la kvanto de 265 mil ekzempleroj. Konatiĝu iom pli kun la tutmonda vojaĝestro, legante la sekvan intervjuon.

spertulo

D-ro Boris Kolker



Naskiĝis en 1939 en Tiraspol, Moldavio (Sovet-Unio), kaj en 1993 transloĝiĝis al Usono. Instruisto de lingvoj, tradukisto kaj aŭtoro de tri popularaj E-lernolibroj (du por rusparolantoj kaj unu por E-parolantoj). Esperantistiĝis en 1957 kaj doktoriĝis en 1985 pri lingvoscienco per la disertaĵo “Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto”. En diversaj tempoj: kunfondinto kaj kungvidanto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio), REU (Rusia Esperantista Unio), komitatano de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), membro (ekde la jaro 1959), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA, kunfondinto kaj membro de EVA (Esperantlingva Verkista Asocio). Vicprezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) de ILEI/UEA. Membro de la Akademio de Esperanto, Honora Membro de UEA, kunredaktoro de *Monato*. Gvidanto de amasa koresponda kurso en Rusio, instruisto de E-o ĉe usonaj universitatoj en San-Francisko kaj Hartford, kaj nuntempe gvidanto de Internacia Perfektiga Koresponda Kurso (IPKK).

http://eo.wikipedia.org/wiki/Boris_Kolker

Brazilei: Kiu dato en via esperantista vivo estas la plej signifoplena por vi?

Boris Kolker: Antaŭ duonjarcento veturi el Sovet-Unio eksterlanden estis preskaŭ neeble. Per miraklo mi trafis en la unuan sovetian grupon al la 48-a Universala Kongreso en Sofio (Bulgario), ĉar UEA konfirmis min kiel prelegonton en la Internacia Somera Universitato. Nia 35-persona grupo veturis el Moskvo per trajno. Dum la vojo mi ĉiam timis, ke venos polico kaj nuligos mian eksterlandan vojaĝon. La 25-an de julio 1963 nia trajno trapasis la limon kaj enveturis en Rumanion. Tiam mi komprenis, ke mi vere partoprenos en la Universala Kongreso. Tio estis la plej feliĉa tago en mia longa esperantista vivo.

Brazilei: Vi konatiĝis kun Esperanto en 1957 kaj du monatojn poste, ekinstruante la lingvon, vi memlernis ĝin. Ĉu tiuj fruaj kontaktoj kun la lingvo naskis en vi la amon al instruado aŭ vi akiris tion poste per sistemaj studoj?

Boris Kolker: Mi estis tre entuziasmigita pri la lingvo, kiu malfermis por mi fenestron al la mondo, kaŝita malantaŭ la fera kurteno. Kaj mi ekdeziris tuj dividi mian ĝojon kun aliaj homoj. Ruslingvaj lernolibroj de Esperanto ne estis haveblaj, ĉar ili estis neniigitaj dum la diktatora regado de Stalin, kiam Esperanto kaj esperantistoj estis persekutataj. Oni sendis al mi etan lernolibron en la pola lingvo. La unuan kurson mi instruis per ĝi, kvankam mi apenaŭ komprenis la polan lingvon. Helpis tio, ke mi estis studento de pedagogia supera lernejo kaj studis por fariĝi instruisto de la rusa kaj franca lingvoj. Poste dum pluraj jaroj mi instruis per rekta Ĉe-metodo, kiu ne postulas uzon de lernolibro. Kaj fine mi mem verkis lernolibron, kiu dum 35 jaroj estas la plej populara lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj.



Brazilei: Ĉiu kursgvidanto iel fariĝas ŝatanto de iu lingva angulo. Kiu flanko de Esperanto pleje interesas vin?

Boris Kolker: En Esperanto mi pleje ŝatas ĝian vortfaradon, kiu estas ĉefa risorto de la lingvo. Neniu lernolibro de Esperanto koncentriĝas tiel multe ĉe la vortfarado, kiel la mia.

Brazilei: Kiuj spertoj multe kontribuis al via plua formiĝo kiel verkisto: ĉu tiuj kiel membro de la Akademio de Esperanto aŭ tiuj kiel kunredaktoro de *Monato*?

Boris Kolker: Nu, mi ne konsideras min verkisto, kvankam de tempo al tempo mi ion verketas. Pli ol verkisto, mi estas lingvisto kaj instruisto de Esperanto.

Brazilei: La ĉi-numera eldono de nia revuo estas dediĉata al temo, kiu iam kaj iam vekas la imagemon de la esperantistoj, nome Enkonduko de Esperanto en brazilajn lernejojn. Ĉu vi estas favora aŭ malfavora al tiu multjara revado?

Boris Kolker: Tian revon havas ĉiu aktiva esperantisto. Post la partopreno en la 87-a Universala Kongreso de Esperanto en Fortalezo, mi sentas min iomgrade brazilano. Do mi estos aparte ĝoja, se tiu revo iom post iom plenumiĝos ĝuste en Brazilo.

*“(…) La libro **Vojaĝo en Esperanto-Lando** estas kompleta. Ne sufiĉas lerni per ĝi sed ellerni per ĝi. Ĉiuj lernantoj, kiuj atingos la lastan lecionon, obeante la saĝajn instrukciojn, certe eniros en ‘*Esperantolandon*’, kaj povos sin konsideri ‘*Civitano de la Mondo*.’”*



Alcyr Guedes
Taubaté/SP

“La kurso estas tre agrabla vojaĝo. (...) Mi mem, post ses jaroj, de kiam mi finis la kurson, decidis restudi per ĝi. Kaj la plezuro lerni estas la sama. (...) Mi multe progresis en mia lernado kaj en esperantujo. Studi per la kurso de d-ro Boris estas valorega sperto.”



Adriana Pavani
Barra Bonita/SP

Brazilei: En kelkaj landoj, kiel Brazilo, tendumado – kiun vi multe spertis –, ne estas tradicia aranĝo en esperanta medio. Kiu estas la graveco de tiaj aranĝoj por lingvolernantoj? Kiaj estas la nunaj tendaraj aranĝoj?

Boris Kolker: Ŝajnas, ke ankaŭ en Rusio tendumado estas nun malpli populara ol en mia esperantista juneco. Sed mi kredas, ke Esperanto-tendaroj en Rusio (kiuj nun ne nepre okazas en tendoj) plu havas altan nivelon kaj kontribuas al mergiĝo en Esperanto-vivon.

Brazilei: “*Vojaĝo en Esperanto-Lando*” estas ĉie taksata kiel uzinda gvidilo por perfektiga kurso. Kiun lernolibron vi opinias bona por elementa kurso?

Boris Kolker: Feliĉe, nun en la retejo “lernu!” estas bonaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Evidente, en diversaj landoj estas bonaj nacilingvaj lernolibroj, sed mi ne konas ĉiujn.

Brazilei: Via opinie, kial la realaj E-klubo ne strebas atingi la lingvan kaj kulturan nivelojn bildigitajn en via gvidlibro?

Boris Kolker: Mi tre esperas, ke mia libro “*Vojaĝo en Esperanto-lando*”, kiu estas siaspeca taglibro de ideala Esperanto-klubo, kontribuas kaj kontribuos al pliriĉigo de la kluba vivo en Esperantujo.

Brazilei: Intervjue al gazeto *Komencanto*, vi diris, ke la sekreto de la sukceso de via perfektiga lernolibro kuŝas en via persona gusto koncerne la zorge elektitajn tekstojn. Kio aŭ kiu helpis al vi fajnigi viajn lingvajn sentojn?

“Vojaĝo en Esperanto-Lando estas lernolibro vere unika en Esperantujo tial, ke ĝi prezentas la lingvon ne nur kiel gramatikon, sed ankaŭ kiel parton kaj portanton de kulturo.”



Jader Rodrigues
Lavras/MG

“Kara ĉiĉerono Boris, la Vojaĝo estis treege bela kaj profitdona. Mi nur povas diri al vi: dankon, mia amiko, pro la pacienco kaj dediĉo progresigi min. Tiu riĉaĵo estas neforgesebla.”



Márcia de Castro
Praia Grande/SP

Boris Kolker: Kvankam en Sovet-Unio ne estis eble aĉeti Esperanto-librojn el eksterlando, mi sukcesis kolekti imponan bibliotekon. Praktike, mi havis ĉion, kion mi emis havi, kvankam tio estis tre malfacile efektivebla. Mi avide legis Esperantajn librojn kaj gazetojn kaj aktive partoprenis en la landa kaj internacia movado. Ĉio ĉi donis al mi sufiĉan bazon kaj kompetentecon por verki tiel kompleksan perfektigan kurson de Esperanto kaj gvidlibron pri la Esperanto-kulturo.

Brazilei: Por kiaj “vojaĝantoj” via gvidlibro estis originale elpensita: ĉu por tiuj korespondaj aŭ por tiuj enklasaj?

Boris Kolker: Nu, kiam la ideo pri tiu libro venis en mian kapon en la fora jaro 1987, mi tiam pensis precipe pri memlernantoj. La unua eldono de “*Vojaĝo*” aperis en Moskvo fine de la jaro 1992. En junio 1993 nia familio transloĝiĝis en Usonon, kaj post du semajnoj mi, David Jordan kaj Mark Fettes ekinstruis per tiu libro en la Ŝtata Universitato de San-Francisko. Iom poste mi ekuzis ĝin por la koresponda kaj reta kursoj.

Brazilei: Kiuj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de koresponda kurso kompare kun tiu enklasa?

Boris Kolker: La avantaĝoj: vi povas elekti oportunan tempon por lernado kaj dediĉi al ĝi tiom da tempo, kiom necesas; vi ricevas individuajn korektadojn kaj konsilojn flanke de la instruisto. La malavantaĝoj: vi estas ekster kolektivo kaj ne havas eblon de parola praktiko.

“Mi asertas, ke la kurso gvidata de d-ro Boris Kolker per lia libro, Vojaĝo en Esperanto-Lando, estas grava okazo por ke ni konatiĝu kun la mirinda esenco de Esperanto.”



Evandro Gouvêa
Pouso Alegre/MG

“Mi studis per la kurso de Boris dum 4 jaroj (1998-2002). Mi diras, ke ĝi estis vera fakultato. Mia libertempo ne estis abunda dum tiu tempo, do mi studis tre malrapide. Sed estis perfekta, grandega, profita sperto.”



Aparecida R. Tagliari
Araraquara/SP

Brazilei: Post estiĝo de IPKK (Internacia Perfektiga Koresponda Kurso), ŝajne, vi ne plu emas gvidi ĉeestan kurson. Ĉu retkursoj estas la estonteco de lingvo-instruado?

Boris Kolker: La retkursoj de Esperanto havas grandan estontecon. Sed neniukaze oni limigu sin per ili. La ĉeesta instruado havas ne malpli gravan signifon.

Brazilei: De kiam ekzistas IPKK, kiel ĝi funkcias kaj kiom longe daŭras la vojaĝo?

Boris Kolker: IPKK ekzistas dum deko da jaroj. Mi sendas al ĉiu studanto lecionojn retletere, ricevas la plenumitajn lingvajn taskojn, korektas kaj komentas ilin kaj resendas. Kvankam studado per “*Vojaĝo*” donas grandan plezuron kaj grandan utilon, ĝi postulas ankaŭ nemalgrandan laboron. Ne ĉiuj miaj lernantoj sukcesas atingi la finon de nia komuna vojaĝo en Esperanto-lando. Iuj ekdormas dumvoje, poste vekigigas kaj pluvojaĝas. Iuj ekdormas por ĉiam. Sed ĉiuj restas anoj de Klubo de Vojaĝantoj kaj partoprenas en nia retlisto. Mi trejnas miajn lernantojn kvazaŭ Olimpikajn ĉampionojn. Rezulte, post la fino de nia komuna vojaĝo ili sentas sin en Esperanto kaj en Esperanto-lando kiel fiŝoj en akvo, kiel birdoj dum flugado. Cetere, brazilanoj plejmultas inter miaj lernantoj kaj diplomitoj.

Brazilei: Kion vi konsilas al kursgvidantoj, kiuj iam intencos uzi vian lernolibron en reta aŭ ĉeesta kurso?

Boris Kolker: Mi konsilas speciale atenti evoluigon de krea lingvoregado. Nin gvidu la devizo: Esperanto estu regata samnivele kiel la gepatra lingvo!

Brazilei: Laste, sed ne balaste, laŭ via doktoriga disertaĵo, ankoraŭ ne tradukita al Esperanto, kiu estas la plej grava kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto?

Boris Kolker: Membro de la Akademio de Esperanto, brito Douglas Gregor iam trafe diris, ke en Esperanto malantaŭ la latina fasado kaŝiĝas la slava mekanismo. Fakte, temas pri la mekanismo de la rusa lingvo; tion mi esploris en mia doktoriga disertacio.



Esperanto en la Lernejojn

Ivaldo Alves de Souza

Delonge kaj insiste la revo de la esperantistaro en la tuta mondo estas la oficiala instruado de Esperanto, devige aŭ ne, tamen desupre proponata al la lernantaro. Tiel la Movado solvus unufoje kaj definitive siajn ĉefajn ekzisto-kialojn, tio estas la disvastigadon kaj instruadon de Esperanto – kies altaj kostoj ĉiam malfaciligis/as ĝian plenumon – kun sekva agnosko de la lingvo fare de la ekstera publiko. Multaj estis en la mondo kaj en la pasado de cent dudek unu jaroj la klopodoj tiudirekte, kelkaj estas la atingoj kaj des malpli estas la pozitivaj rezultoj devenintaj el tiuj disaj iniciatoj.

La damna malriĉeco kaj la nesufiĉe bona organizateco, trajtoj konstantaj de la esperantista movado, multfoje ne permesis/as identigi kaj kapti la favorajn oportunojn kiuj ekzistas ĉirkaŭ ĝi. Tia estas la kazo de la brazila ĉef-leĝo, kiu pritraktas la bazojn kaj direktivojn por edukado en Brazilo. Datita de la 20-a de decembro 1996, la leĝo n-ro 9.394 malfermegas la pordojn de la lernejoj al la instruado de Esperanto. Tiu leĝo dividas la brazilan eduk-sistemon je tri niveloj: la infana, la baza, kaj la supera. Kiam temas pri amasa instruado de Esperanto, el tiuj, estas la baza kiu plej interesas al la esperantistaro. Laŭ la leĝo ĝi estas dividita je du aliaj subniveloj: la fundamenta kaj la meza. La unua daŭras naŭ jarojn kaj, ekde la kvina lernojarro, la artikolo 26-a, § 5-a devigas la instruadon de minimume unu moderna fremda lingvo, kies elekto estas tasko de la lerneja komunumo (instruistoj, lernantoj,

La vojo de la
Leĝoprojekto



20/12/1996

La parlamento aprobas kaj sankcias leĝon, kiu devigas enkondukon de fremda lingvo en ĉiujn mezgradajn enlandajn lernejojn, laŭ elekto de la lerneja komunumo mem.

gepatroj), kaj ĝia plenumo realiĝos laŭ la ebloj de la koncerna institucio; la meza subnivele daŭras tri jarojn dum kiuj, laŭ la artikolo 36-a, alineo III, estos deviga la instruado de unu moderna fremda lingvo elektita de la lerneja komunumo kaj alia dua moderna fremda lingvo, laŭopcia kaj laŭ la ebloj de la lernejo. Konklude, rilate lingvo-instruadon, en neniuj momento la leĝo-teksto postulas ĉi-tiun aŭ tiun lingvon. En aliaj landoj, kiel ekzemple Hungario, ekzistas listo de permesataj lingvoj por oficiala instruado en kiu enlistiĝas ankaŭ Esperanto; en Brazilo tia listo ne ekzistas kaj la nura postulo estas ke la lingvo instruota estu fremda kaj moderna. Do, Esperanto estas laŭleĝe instruebla.

Krom tiuj du referencoj, ekzistas en la sama leĝo tria ebleco por oficiale instrui Esperanton en la brazilaj lernejoj. Temas pri la teksto de la artikolo 24-a, alineo IV, laŭ kiu “povos organiziĝi klasoj kun lernantoj el diversaj lernejoj... kun kono-nivele ekvivalentaj... por lernado de fremdaj lingvoj “ (Ĉu Esperanto estas nefremda lingvo?).

Gapiga estas la fakto ke la aktiva esperantistaro ordinare supozas ke per la forto de aprobita leĝo, ĉiuj streĉoj kaj mon-elspezoj por efektivigado de tiu leĝo restos afero ekskluziva de la oficiala instanco, do, ke fine okazos simpla transdono de taskoj kaj financaj elspezoj. Devenas de tio, do, la ĉiama espero kaj ĝisnunaj klopodoj por oficiala enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Bonvena kaj laŭdinda estas la individua iniciato de ne-esperantista senatano, S-ro Cristovam Buarque, eks-rektoro de la Universitato de Brazilo, kiu konscia pri la propedeŭtikaj kvalitoj de Esperanto kaj vidinte ĝin kiel taŭgan ilon por la konstruado de kulturo de paco, ne nur internacie sed ankaŭ enlande, proponis la oficialan enkondukon de Esperanto en la tri lastajn lernejojn de la brazila baza edukado (leĝ-projekto n-ro 27/2008). La projekto trairos longan malfacilan vojon, tamen ĝi jam ricevis pozitivan akcepton ĉe la Komisiono pri Edukado

21/02/2008



Senatano Cristovam Buarque, el Brazilo/DF, prezentas leĝo-projekton por enkonduko de Esperanto-instruado en enlandajn mezlernejojn kadre de la Leĝo pri instruado de fremda lingvo, de 20/12/1996.

kaj atendas baldaŭan voĉdonadon ĉe la Senato kaj poste ĉe la deputita ĉambro. Se ĝi venkos tutcertan kontraŭstaron ĉu de plejparto de la parlamentanoj, ĉu de tuta gazetaro (kiu ĝis nun ne informiĝis pri ĝia ekzisto), ĝi fine dependos de la leĝo-konsilantoj de brazila registarestro por ĝia sankcio kaj subskribo. Ĉu brazila movado disponas nun pri la necesaj infra-strukturo kaj organiziteco por starigi konvinkan lobion ĉe tiuj diversaj malfacilaj momentoj?

Kiel ni supre konstatis, laŭ LDB (leĝo pri direktivoj kaj bazoj de brazila edukado), jam eblas elekti Esperanton kiel modernan fremdan lingvon ek de la kvina lernojaro de la fundamenta edukado kaj ne nur ĉe la lastaj tri jaroj de la meza edukado. Kion validas la iniciato de la senatano, celante nur mezlernejanon kiuj deziras tutsimple prepariĝi por alproksimiĝanta abiturienta ekzameno kaj tial forfuĝas de kromaj opciaj lernproponoj? Ĉu aperos pravigaj sinproponaj lernantoj eĉ post konsciiga disvastiga kampanjo? Ĉu ekzistas bonvolemo favora al Esperanto ĉe la eduk-sistemoj federacia, subŝtata kaj municipa por plenumo de la leĝo ene de tri jaroj, kiel postulas la leĝo?

Do, ne estas pro manko de leĝa apogo ke Esperanto ankoraŭ ne estas oficiale instruata en Brazilo. Kio mankas fakte estas la ekzisto de nacia strategia plano, homfortoj kaj sufiĉaj monrimedoj por entrepreno de vasta, tamen laŭgrada diskonigado de Esperanto al la lerneja komunumo (instruistoj, lernantoj, gepatroj) por ke tiuj estu allogataj al lernado de la internacia lingvo kaj ke tiuj, konsciĝinte pri siaj rajtoj entenataj en la jam aprobita leĝo (LDB) kaj en la aprobita leĝo-projekto, postulos, ĉe la oficialaj instancoj, la formiĝon de Esperanto-klasoj ĉe siaj lernejoj.

En ambaŭ okazoj, la nura ekzisto de aprobita leĝo favora al instruado de Esperanto ne aperigos kandidatojn dezirantaj lerni ĝin. Nur konsciiga diskonigado, elstarigante la avantaĝojn de Esperanto por la lerneja publiko, sukcesos tiun miraklon.



27/03/2008

Senatano Marcelo Crivela, el la Eduka Komisiono, favore raportas pri la amendo-propono de senatano Cristovam Buarque.



Amendo Cristovam Buarque Ĉu trafa? Ĉu nepra? Ĉu sufiĉa?

Prof. Paulo Nascentes

Enkonduko de Esperanto en brazilajn lernejojn daŭre estas historia revo de multaj agemaj intelektuloj. Meze al manko de publikaĵoj kaj esplorfontoj, eblas informiĝi pri la apero de la unua instrulibro eldonita en Brazilo, okazinta la 19-an de marto 1904, kaj ankaŭ pri la starigo, du jarojn poste, de “Suda Stelaro”, la unua brazila Esperanto-grupo, fondita en Kampinoj, San-Paŭlo. Laŭ artikolo de **JORNAL PEREGRINO**, mar. 2007, “*as Leis nº 1162 de 1913 (Rio de Janeiro), nº 759 de 1918 (Sergipe) e a nº 2083 de 1919 (Distrito Federal), autorizaram, em caráter facultativo, o ensino do esperanto em escolas públicas*”. Tiuj leĝoj tamen ne estas unikaĵo. Aprobiĝis intertempe kelkaj similaj leĝoj en diversaj brazilaj urboj. Tio tamen meritas apartan artikolon. Ĉi-momente nia fokuso estu la plej ĵusa kaj furora leĝopropono, almenaŭ inter esperantistoj brazilaj kaj eĉ eksterlandaj.

Surtable, la Leĝopropono de Cristovam Buarque

Malgraŭ sia nepionireco, la Cristovam-amendo ja alvenas en speciala politika momento, precipe kiam propono enkonduki Esperanton en usonajn lernejojn estis perrete voĉdonita de pluraj homoj el diversaj landoj, kaj sukcesis atingi la duan lokon inter tiuj pri Edukado. La menciita Leĝoprojekto (N-ro 27, de 2008) “modifas la Leĝon n-ro



Decembre 2008:

La ĝenerala esperantista publiko ekscias pri tiu amendo-propono pere de novaĵo-dissendlistoj.

9.394, de la 20-a de decembro 1996, por trakti pri la nedeviga inkludo de Esperanto-instruado en Meznivela Instrusistemo". Tri jaroj estas la limtempo por ĝia plena reguligo. Demandoj ne ĉesis aperi inter esperantaj aktivuloj kaj simpatiantoj. Verŝajne inter ili la plej defia temas pri ofertkondiĉoj de tiu studobjekto al plejmulto de la lernejoj. Laŭ kelkaj brazilaj movadanoj, tio ŝajnas ege malfacila tasko, pro la malfacileco mem taŭge prepari bonajn instruistojn dum tiom mallonga tempo. Oni ne preteratentu tiun gravan punkton, tamen iagrade ĝi devenas el la manko mem de socia percepto pri vera utilo de Esperantostudo. Resume, se oni konsideras, ke nenia ajn komunika baro ja ekzistas pro lingva diverseco, kaj ke la nuna internacia lingva ordo sufiĉe bone solvas niajn bezonojn, kial do antaŭzorgi pri tio?



agenciabrasil.gov.br

Cristovam Buarque — politikisto, iama rektoro de la Universitato de Braziljo (UnB), iama ŝtatresto de la Federacia Distrikto, Braziljo. Li aŭtoras multajn projektojn celantajn la plibonigon de edukado en la lando, inkluzive de edukprogramoj por la indiĝenaj komunumoj.

Iam gvidita de Senatano Marcelo Crivella, la Komisiono pri Edukado, Kulturo kaj Sporto analizis kaj aprobis la amendon, sed ankaŭ avertis pri kelkaj kontraŭdiroj, ne en la merito, sed en la elektitaj leĝaj vojoj. Laŭ tiu analizo, la plej taŭga vojo devus respekti teknikajn aspektojn specife tiujn koncernantajn al lernejoj, instruistoj kaj spertuloj de ĉiu loka edusistemo. Alivorte, estas la fakuloj mem kiuj devas doni la finan opinion, ne parlamentanoj. Meritas tio pli detalan analizon, ĉar



19/02/2009:

Senatano Mozarildo Cavalcanti anstataŭas la senatanon Marcelo Crivella kiel nova raportisto en la Eduka Komisiono.

estas malsamaj ebloj tiucele. Ekzemple, la nomumo de delegitaj fakuloj alvenintaj el diversaj brazilaj ŝtatoj por asesori la leĝdonanton. Ankaŭ en publikaj aŭdiencoj, la komunumo, ties organizoj kaj civitanoj povus libere raporti pri jam funkciantaj klasoj kaj diskuti siajn spertojn. Dum senatano Cristovam reliefigas edukadon al paca kulturo, sinsekvo de eventuala adopto de la Leĝo, la analizo de la Komisiono reliefigas aliajn politikajn atutojn, kiel la apogo de Unesco al la kultura kaj scienca rolo de Esperanto. Ĝuste politikaj argumentoj plej facile povas konvinki parlamentanojn. Tamen ili ĉefe reagas al popola premo, vera mezurilo de komunuma deziro. Kiel reagas ekzemple la amaskomunikiloj? Tio ankaŭ plividigas la gravecon batali tiudirekten. Kian utilon portas la instruado de Esperanto tra nia lando? Kion finfine gajnas la socio?

Necesas kultura ŝanĝo

Por percepti kaj perceptigi al ekstera publiko kiom necesa, trafa, nepra kaj sufiĉa estas tiu amendo, nian imagpovon ni uzu. Vi fermu la okulojn kaj imagu tion, ke la Leĝo jam estas finaprobata, ke multaj Esperanto-kursoj jam funkcias en preskaŭ ĉiu urbo. Komprenoble, beletraj kursoj do preparis tutlande sufiĉan nombron da instruistoj. Imagu ankoraŭ plie: kreskis la nombro de profesiuloj pri Esperanto-instruado, internacia turismo, dudirekta traduko, kultura produktado, kiel filmoj, libroj, muzikspektakloj, literaturaĵoj. Eĉ el aliaj landoj venas mendoj por tia industrio de kulturaĵoj, kaj Brazilo eksportas ilin preskaŭ samgrade kompare al la nunaj grandaj kulturaĵproduktantoj. De tio venas nepra konkludo: finfine Brazila Esperanto-Movado kune, harmonie, ageme kaj unudirekte lernis labori. Mirakloj tiaj foje simple devenas



12/03/2009

Teksto de la leĝo-propono estas liverita al la nova raportisto de la Eduka Komisiono, senatano Mozarildo Cavalcanti.

el la sama laboro, sed per nova pensmaniero, sinteno kaj ago.

Nia imagpova ekzerco ne frustru nin tamen. Ni revenu al nia grava defio: la preparado de instruistoj kapablaj okupi la oficialajn laborpostenojn ĉiujare ofertatajn de diversaj urbodomoj. Sufiĉe intensa laboro kadre de niaj mezgradaj lernejoj kaj universitatoj kompreneble estis okazinta dum la lastaj jaroj ekde la apero de la Leĝopropono. Bone planitaj vizitoj al lingvoinstruistoj, lernejestroj kaj pedagogoj pli ofte okazis. Prelegoj pri internacia interkompreniĝo, demonstraj klasoj, lingvaj festivaloj, muzikprezentado de niaj artaj valoroj kaj simplaj teatraj skeĉoj fariĝis tiam komuna prioritato de preskaŭ ĉiuj E-klubo kaj Asocioj. Al la redakcio de radistacioj, televidelsendejoj kaj gazetaro amase alvenis taŭgaj informiloj, bonaj artikoloj, intervjuemaj esperantistoj. Precipe lingvoinstruistoj kaj instruistoj ĝenerale okupiĝis pri eklerno de Esperanto, kelkaj el ili eĉ memlernis ĝin per la diversaj kursoj en la retpaĝaro de *Lernu.net*, malgraŭ la progresigaj ĉeestaj kursoj starigitaj en iliaj laborejoj. Unuvorte, ne malfacilaj realigeblaj kongruaj agoj dume daŭre okazis. Ĉiu aparta eĉ malgranda venko tuj fariĝis mem aldona motivigo al nia diligenta kolegaro.

Ŝusa reenkonduko de Esperanto ĉe UnB

Dum kelka tempo pioniroj, laŭ sia eblo, ekinstruis Esperanton en UnB (Universitato de Braziljo). En la jaro 2005 ree ĝia instruado okazis. Tiam la ŝtatestro en Braziljo estis ĝuste la Proponanto de la amendo, kaj la vic-ŝtatestro estis la iama deputitino Arlete Sampaio. Al ŝi alproksimiĝis grupo de movadanoj el Braziljo antaŭsciante tion, ke ŝi estas simpatianto de la politika flanko de Esperanto. Ŝi sin proponis



Fonto:

http://www.senado.gov.br/sf/atividade/materia/detalhes.asp?p_cod_mate=83989

akompani la grupon en aŭdiencon kun la tiama rektoro. Por nia surprizo, liaj unuaj vortoj, ankoraŭ en la antaŭĉambro, ŝajnis familiaraj: “Kioma horo estas?”, li ridete demandis kaj rapide aldonis portugale: “Nur tiun frazon mi memoras, ĉar mi iomete konatiĝis kun Esperanto dum mia infanaĝo.” Kelkajn semanojn poste aprobiĝis en LET/UnB, la faka Departemento pri Instruado de Fremdaj Lingvoj, la propono instrui Esperanton kiel komunan kurson. Ekde tiu jaro ok sinsekvaj klasoj okazis dank’al tiu resumita politikagado kaj al sindediĉaj universitataj instruistoj, inter kiuj menciindas prof-ro Josias Barboza, kies instrumaterialo estas profite uzata ĝis nun. Similaj ekzemploj ekzistas nialande en diversgradaj aliaj lernejoj. Ampleksiĝas hodiaŭ nia celo. Tio tamen meritas apartan alineon, ĉar temas pri novaj revoj kaj bataloj.

Ĉi-momente, niaurbe, grupo de universitataj instruistoj kaj *pacaj batalantoj* sisteme renkontiĝas cele al propono de Interlingvistiko kaj Esperantologio kiel nedeviga studobjekto kadre de Beletra Kurso, en la sama Departemento LET. Laŭ la konata lingvosciencisto prof-ro Detlev Blanke, tra la scienca pordo Esperanto devas eniri la universitaton, kaj tiel plifirmigi sian prestiĝon. Poentigi studentojn konkludantajn tiun lernobjekton per aldono de 4 kreditpoentoj kompreneble pli facile allogos plurajn aliajn. Tio tamen nepre postulas nacian kaj internaciskalan partneran laboron, ĉar konvenas de tempo al tempo inviti eksterlandajn gastprofesorojn, ekzemple. Oficiala institucio de Esperanto en Brazilo, alivorte BEL, devos nepre partopreni tiajn iniciatojn kunlabore kun UEA kaj ties fakaj instancoj. Partnero estas la ŝlosilvojo.

Plej proksima kunvivado de kvardeko da profesoroj el la tuta mondo, dum la antaŭkongresa Amsterdama Konferenco, kies gastiganto estis prof-ro Win Jansen, povos malfermi gravan partneran vojon. Tie ĉeestis interaliaj prof-ro Humphrej Tonkin, la Prezidanto de *ESF – Esperantic Studies Foundation*; d-rino Katalin Kováts, la redaktanto de la fama retejo *Edukado.net*, subvenciata de *ESF*; d-rino Ilona Koutny, kungvidanto de kurso pri Interlingvistiko en la Universitato de Poznano, en Pollando; d-rino Zsófia Korody, vic-prezidanto de ILEI kaj kunordiganto de la laborema Interkultura Centro de Herzberg, la Esperanto-urbo, en Germanio, kaj d-ro Detlev Blanke, profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperantologio en Universitato ankaŭ en Germanio. Imagu situacion tian: Ĉar solviĝis nia ĉefa defio, abundaj hodiaŭ estas

brazilaj Esperanto-instruistoj kaj lernejoj kun ties sukcesaj E-kursoj. Agema kaj politike efika, nia junularo vojaĝas tra la mondo kaj konkeras korojn kaj mensojn al solidara kaj egalrajta maniero internaciskale komunikiĝi. Nova lingva ordo ekestas. Feliĉo abundas sur la Tero.

Kara leganto, finiĝas ĉi artikolo. Premas nin la tre konata verso de Carlos Drummond de Andrade: “Kaj nun, Jozefo?” Imagovan ekzerceton mi proponas al vi, kara leganto. Spiru malrapide kaj fermu viajn okulojn. Malstreĉiĝu! Ni fantaziumu iomete... La nun ne plu Leĝopropono, sed Leĝo, ja plene funkcias en la tuta brazila teritorio. Surprizita, ĉu? Ĝi trafas, nepras, sed ne sufiĉas tamen. Mankas la plej grava ŝanĝ-faktoro: Vi mem. Tempo estas por palpebrumi, tre malrapide malfermi la okulojn, malrapide movi fingrojn, brakojn, piedojn, la tutan korpon. Unuvorte, lasu viajn seĝojn, fotelojn, vian restadon sur belbrilega lulilo, kaj kongrue kunagu en via ĉirkaŭaĵo. Ŝanĝi nedeziratan realon vi volas, ĉu? Jes, ni povas. Tiu estas la plej ĵusa leciono de la Historio. Jes, ni povas!

Finfine nia mondĉivitana kondiĉo disponas je neŭtrala komunikilo. Kaj granda feliĉo abundas sur la Tero!

Paulo Nascentes estas profesoro pri la Portugala kaj instruisto de Esperanto, kunordiganto de Esperanto-Kurso (UnB/LET/Interfoco) kaj de E-Nukleo (N.R.O. União Planetária/TV Supren)

Referencoj:

BARBOZA, Josias. Esperanto por Lernejaj Klasoj 1: paroliga metodo kun ekzercaro. Gvidlibro por instruistoj. Braziljo/FD: Unio Planeda: Brazila Esperanto-Ligo, 2008. 164p.

BUARQUE, Cristovam. Projeto de Lei do Senado (PLS) nº 27, de 2008, que altera a Lei nº 9.394, de 20 de dezembro de 1996, para dispor sobre inclusão facultativa do ensino do Esperanto no ensino médio.

COMISSÃO DE EDUCAÇÃO, CULTURA E ESPORTE. PARECER Nº x, de 2008, em decisão terminativa, sobre o Projeto de Lei do Senado (PLS) nº 27, de 2008. Relator: Senador Marcelo Crivella.

JORNAL PEREGRINO. A História do Esperanto em Ribeirão Preto. Ribeirão Preto/SP, mar. 2007.

Ne sufiĉas instrui en universitato por esti nomata profesoro...

Ni brazilanoj, ĉu pro nescio ĉu pro kutimo, plejofte misuzas la titolon 'profesoro' en esperantista rondo. Sendistinge oni alparolas la kluban kursgvidanton kaj la universitatan docenton per tiu titolo. Okazas, ke tiu distingado, laŭ bonaj vortaroj, estas misgvida internacie kaj tial nepre evitinda en esperanta medio. Multfoje tiu titolo estas misuzata eĉ ĉe universitatoj mem, kaj la motivo estas evidenta: ne ĉiu universitata instruisto estas profesoro. Legu kion diras la retvortaro Revo pri tiu altrangulo:



“Profesoro = Altranga instruisto en supera lernejo, pli altranga ol docento; normale, por ricevi la pedagogan gradon de profesoro oni bezonas havi la sciencistan gradon doktoro (...).”

Supletivo = komplementaj studoj
Bacharelado = bakalaŭrigo
Licenciatura = licenciado
Pós-graduação = postdiplomigo
Mestrado = magistrigo
Doutorado = doktorigo
Pós-doutorado = postdoktorigo

Do, karaj kursgvidantoj, kiam iu lernanto vokos vin per 'profesoro', se necese, tuj klarigu al li/ŝi. Nun kaptu la okazon por legi ankaŭ rilateman liston de vortoj, kiun ni kompilis por vi el tiu konsultinda retvortaro. Se vi interesiĝas ankaŭ pri akademiaj titoloj kaj rangoj, vizitu la kuriozan retejon

<<http://eo.wikipedia.org/wiki/Titulo>>.

Vortareto

Abituriento = Mezgrada diplomito, kiu finis la gimnazian kursaron, sukcese plenuminte la koncernan ekzamenon: *havi sian abituriantan diplomon*.

Bakalaŭro = Persono posedanta la plej malaltan universitatan titolon.

Docento = Instruisto en universitato ne ricevinta titolon de profesoro; libera docento = privata klerulo, kiu ricevis permeson gvidi kurson en universitato kaj estas salajrata nur de la kursanoj mem.

Dekano = Ĉefprofesoro de universitata fakultato.

Gimnazio = Mezgrada lernejo diversmaniere organizata laŭ la landoj; gimnaziano = liceano.

Habilitiĝo = Duagrada doktoriĝo, kiu estas la kondiĉo por profesoriĝo en Pollando (*)

Kampuso = Universitata tereno: *kampusano*.

Katedro = Profesora posteno

Lekcio = Leciono en formo de scienc-instrua parolado en universitato aŭ alia samranga instituto.

Lektoro = Titolo de universitata instruisto, profesoro, diverse uzata laŭ la landoj, kaj plej ofte koncernanta instruiston pri lingvoj.

Lernoservo = Senpaga aŭ malalte pagata servo de junulo ĉe metiisto aŭ profesiulo por lerni la metion aŭ profesion: *li lernoservas ĉe mi*. Lernoservanto = staĝanto.

Licencio = Universitata rango, meza inter matureca ekzameno kaj doktoreco: *licenciulino pri sociaj komunikoj*.

Magistro = Universitata titolo ekzistanta en pluraj landoj kaj ranganta inter bakalaŭro aŭ abituriento kaj doktoro.

Mentoro = Saĝa konsilanto kaj gvidanto de junulo

Rektoro = Direktoro de universitato

Staĝanto [provlernanto] = Lernanto en praktikado ĉe metiulo en efektivaj laborkondiĉoj; lernanto en mallonga, intensa kurso: *dumonata staĝo/provlernado*.

Ĉiutaga Esperanto

Nek bildstrio, nek filmo, sed ia kunmetaĵo de bildstrio kaj sonregistro. Jen interesa provo trafe prezenti aŭdvidan materialon por ĝuado de Esperanto, taŭga ne nur por kursanoj, sed ankaŭ por ordinaraj uzantoj de la lingvo. La bildstrian filmeton sonaranĝis la arta grupo LEEN (La Estonto Estas Ni), el Esperanto-Ligo en Israelo. La eksperimenta

filmeto baziĝas sur bildstria versio (scenredaktita de Claudio Nizzi kaj ilustrita de Paolo Piffarerio) de la klasika romano “La gefianĉoj” de la fama italo Alessandro F.T. Manzoni (1785 - 1873).

La nova didaktika filmversio konsistas el tri partoj spekteblaj ĉe <http://farbskatol.net/dotclear/index.php?Movbilda-filmo>. La bildstrioj sinsekvas unu aliajn akompane de paroloj kaj tekstoj sinkrone plenigantaj la parolvezikojn. La esperanta traduko, farita de Battista Cadei, estas tre bona same kiel la komputilaj bildaranĝoj fare de Gian Piero Savio. La provfilmo pekas pro ununura detalo, facile riparebla en novaj provadoj: malgraŭ tio, ke fine de la spektado ni estas informitaj, ke 12 personoj pruntis sian voĉon por legi la tekstojn de la parolvezikoj, ni havas la impreson, ke nur tri-kvar personoj penas malsamvoĉe legi la tekstojn! Nepras do bone diferencigi voĉojn en tiaj legadoj por ke la aŭskultantoj facile distingu unu rolulon disde alia.

Bonŝance, ĉar la elparolo de la interpretistoj estas bona, la spektantoj povas senĝene akompani la rakonton helpe de la bildoj kaj tekstoj en la parolvezikoj, ne multe zorgante pri voĉo-distingo kaj pri interpretado de sentoj. Sed kio motivigas la estigon de tiaj konsumajtoj? Gian Piero, la reĝisoro de la bildstria filmeto mem respondas: “De 120 jaroj la esperantistoj verkas poeziojn, romanojn kaj epopeojn, sed preskaŭ ne uzas sian lingvon en ĉiutaga vivo, en scienco kaj tekniko. Per helpo de filmetoj, la grupo LEEN klopodos iom plenigi ĉi tiun mankon.”

Tiel dirate, la menciata filmeto plene atingas sian celon. Gratulon al la bravaj kreemaj grupanoj!



PLIRIĈIGU VIAN VORTOPROVIZON

Edson Ponciano

Per la biografia verko “Vivo de Lanti” (Eld. SAT, 1976, 274 p.), skribita de Ed Borsboom, ni omaĝas unu el plej gravaj figuroj de la tutmonda esperatista movado, nome la francon Eŭgeno Lanti, fondinton de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Lia skribstilo estas ĉie ŝatata, ĉar ĝi estas simpla, klara kaj sarkasma, bazita sur la principoj de “sufiĉo kaj neceso”.



- Ruz/e** – A: Per rapidaj kaj flekseblaj movoj; B: Surbaze de scioj akiritaj dum praktikado; C: Helpe de lertaj rimedoj ne rimarkataj de iu ajn; Ĉ: Profite de intenca erarigo farata al aliulo.
- Inter/a** – A: Troviĝanta meze de du samaj aĵoj; B: Eco de io, kiu entenas ĉiujn siajn partojn; C: Koncerna nombron el la senfina vico 1, 2, 3, ...; Ĉ: Tia, ke oni povas ĝin dividi nur per ĝi mem kaj per la unuo.
- Brid/i** – A: Malakceli moviĝon de motoro per aparato; B: Reprodukti bestojn por homuzado; C: Alligi tirotan beston al tirotaĵo; Ĉ: Deteni sin de ĉia troaĵo.
- Valut/o** – A: Valoro de papermono rilate metalunuon; B: Figuro malsupera al damo en kartludo; C: Sumo je kiu io estas mone taksata; Ĉ: Servisto, kiu zorgas vestaĵojn de gasto.
- Mat/o** – A: Tufo de sovaĝaj arbustoj; B: Situacio de ŝakreĝo kiu ne disponas sekuran ĉelon; C: Aroma teo preparata per arbedfolioj; Ĉ: Tiu, kiu plenumas saman oficon.
- Ĉifon/e** – A: Premante kaj kirlante por doni formon; B: Difektante pro kunpremado aŭ faldado; C: Fleksante kaj almetante la fleksitaĵojn unu sur alian; Ĉ: Per difektita peco de drapo.
- Modl/a** – A: Imitinda pro sia perfekteco; B: Rilata platon eltranĉitan por reprodukti desegnaĵojn; C: Tia, ke oni ĝin formis knedante moligitaĵon; Ĉ: Reproduktata per enpremo de moligitaĵo en ujon.
- Kirl/i** – A: Transigi aĵon en alian lokon; B: Komuniki al io rapidan movon turniĝan; C: Eligi bruon batante likvaĵon per io plata; Ĉ: Intermeti aĵojn por ne facile distingi ilin.
- Spit/o** – A: Maldika peco de tranĉita ligno; B: Montro de intenca kontraŭstaro al ies volo; C: Senvola elĵeto de io tra la buŝo; Ĉ: Vundo kaŭzata per io pinta.
- Kel/o** – A: Ĉiu el la kvadrataj dividaĵoj de ŝaktabulo; B: Emblemo de ludkarto signita per ruĝa koro; C: Signo por montri altecon de muziknoto; Ĉ: Subtera ĉambro en kiu oni konservas provizojn.

1. **Ruze** – [C] Helpe de lertaj rimedoj ne rimarkataj de iu ajn. [Opcio A = lerte]; [Opcio B = sperte]; [Opcio Ĉ = trompe]. “*Drezen ruze elsavis sin ...*” p. 79.
2. **Intera** – [A] Troviĝanta meze de du samaj aĵoj. [Opcio B = tuta]; [Opcio C = entjera]; [Opcio Ĉ = Prima]. “*La interaj periodoj nur ŝajne aspektas ...*”. P. 80.
3. **Bridi** - [Ĉ] Deteni sin de ĉia troaĵo. [Opcio A = bremsi]; [Opcio B = bredi]; [Opcio C = jungi]. “*...li ne povis tute bridi sian ŝercemon ...*”. p. 203.
4. **Valuto** – [A] Valoro de papermono rilate metalunuon. [Opcio B = fanto]; [Opcio C = valoro]; [Opcio Ĉ = valetio]. “*...per rifuzo de valuto al vojaĝemuloj...*” p. 91.
5. **Mato** – [B] Situacio de ŝakreĝo kiu ne disponas sekuran ĉelon. [Opcio A = vepro]; [Opcio C = mateo]; [Opcio Ĉ = kolego]. “*...kaj reŝovis siajn ŝakpecojn por atingi la maton.*” p. 40.
6. **Ĉifone** – [Ĉ] Per difektita peco de drapo. [Opcio A = knede]; [Opcio B = ĉife]; [Opcio C = falde]. “*...laboristoj estas ofte ĉifone vestitaj.*” p. 165.
7. **Modla** – [C] Tia, ke oni ĝin formis knedante moligitajon. [Opcio A = modela]; [Opcio B = ŝablona]; [Opcio Ĉ = mulda]. “*...li vizitu vespere desegnan kaj modlan kursojn.*” p. 239.
8. **Kirli** - [B] Komuniki al io rapidan movon turniĝan. [Opcio A = movi]; [Opcio C = plaŭdi]; [Opcio Ĉ = miksi]. “*Tiaj pensoj ofte kirlis la animon ...*” p. 218.
9. **Spito** - [B] Montro de intenca kontraŭstaro al ies volo. [Opcio A = splito]; [Opcio C = sputo]; [Opcio Ĉ = piko]. “*...por eldiri strangan ŝercon aŭ spiton.*” P. 229.
10. **Kelo** - [Ĉ] Subtera cambro en kiu oni konservas provizojn. [Opcio A = ĉelo]; [Opcio B = kero]; [Opcio C = Kleo]. “*...ŝi iris en la kelo kun kruĉo, kiun...*”.

Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli.

3 — 4: **kontentiga**; 5 — 7: **bona**; 8 — 10: **bonega**

Lecionoj de Esperanto por tria-aĝuloj

Nova klaso de Esperanto komenciĝis en marto en la Centro pri Maljunulologio ĉe Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj de la urbo Volta Redonda (portugale, AAP-VR), en ŝtato Rio de Janeiro. La kurso, jam de jaroj gvidata de la emerita inĝ. Alberto Flores, daŭros sep monatojn kaj la lecionoj okazas ĉiutage de 8h30 ĝis 10h. La lecionoj celas gemaljunulojn, kiuj, laŭ la vortoj mem de la kursgvidanto, “decidis lerni Esperanton kiel ian okupan terapion kaj kiel utilan manieron de socia kunvivado por havigi novajn amikojn kaj tiel malfermi al si novajn kulturajn horizontojn, kaj ankaŭ por kunlabori por ke estu paco, kompreno kaj frateco inter personoj.”



Unu el la antaŭaj klasoj

En 2008 dek tri lernantoj finis la bazan kurson. Raporte al la informilo de AAP-VR, unu el ili, s-ro João Moreira Filho, diris: “Komence ĝi ŝajnis komplika afero, sed la vero estas alia, ĝi estas pli facila ol mi pensis. Estis tre kontentige lerni tiun lingvon, mi estas tre feliĉa.”

Krom instigi amikecon kaj fratecon inter la kursanoj, lecionoj de Esperanto por tria-aĝuloj helpas al ili plialtigi memestimon kaj stimuli memorkapablon, kio siavice kreskigas ilian memfidon.

Por pliaj informoj pri tiu laboro, telefonu al: (24) 2102-0902

KIEL RAPIDIGI LEGADON

Temo proponata de Elmir dos Santos Lima, kiu afable sendis kopion de la originala raporto, tie ĉi tradukita kaj adaptita por la legantoj de Brazilei.

Laŭdire la dimanĉa eldono de iu grandurba gazeto enhavas pli da informoj ol ordinara homo en mezepoko sukcesus akiri dum sia tuta vivo. Por maltrankvilo de nuntempaj homoj, ne nur la kiomo da informoj kreskas tagon post tago, sed ankaŭ ilia aperritmo. Kion fari por legi tiom da informoj en leg-okazoj pli kaj pli maloftaj? Luj fakuloj sugestas rapidan legadon, aliaj sugestas elekton de nur esencaj legadoj. Se vi apartenas al tiu grupo de legemuloj, laŭ kiuj ĉio estas leginda, estas neniam alia solvo ol lerni rapidlegadon. Sekvas iuj sugestoj por helpi al vi rapidigi vian legokapablon.

1. Forigu ĉiajn bruojn

Malŝaltu televidon, ripozigu la komputilon kaj forgesu la telefonon. Sidu komforte sub ŝirmo de agrabla lumigado kaj prenu tekston plurfoje jam legitan de vi (por ke tiu komenca lego-ekzerco sukcesu, nepras uzi nur tekstojn jam konatajn al vi).

2. Kontrolu vian lego-rapidon

Fiksu unu minuton per via horloĝo kaj kalkulu kiom da vortoj vi sukcesas legi dum tiu tempo. Ordinara leganto legas po ĉirkaŭ 150 vortojn minute kun 60% da lego-kompreno. Aliflanke, rapidleganto sukcesas legi kvinoble ĝis okoble pli rapide, nome ĉirkaŭ 800 vortojn dum sama tempo kun lego-kompreno de 80%.

3. Uzu viajn fingrojn

Dum legado, zorgu, ke vi ne eldiru kion vi legas, per lipmovo. Evitu ankaŭ ĉiam reveni al la sama teksto-linio. Tiukaze, sekvu la

liniojn per la fingro. Ĉio kion vi bezonas fari estas iom post iom akceli la fingro-movon kaj samproporcie rapidigi la legadon. Komence vi apenaŭ komprenos kion vi legas, sed tiel farante, via cerbo estos trejnata sorbi informojn.

4. Vidu laŭgrupe

Per tiu rapidigo, via penso ŝanĝiĝos kaj viaj okuloj lernos fokusiĝi sur ununuran punkton de la vorto. Tiam okazos la magiaĵo: vi ne plu vidos la tekston kiel sinsekvon de literoj, sed kiel penso-unuojn. Por legi, vi saltos de silaboj al vortoj kaj de vortoj al la ĉefaj ideoj de la teksto.

5. Ŝanĝu legaĵon

Iom post iom ŝanĝu la tipon de legaĵo. Lasu tiun tekston, kiun vi jam parkeris, kaj elektu novan, kies enhavo aŭ temo estas konata al vi, ĝis fine vi uzos viajn akiritajn spertojn por eklegi ordinaraĵajn tesktojn de gazetoj kaj libroj.

Faru
mem
teston

Via legado estos rapida, kiam vi sukcesos sorbi la enhavon de tiu ĉi artikolo en 53 sekundoj. (*)

(*) Cele kalkuli la tempon de legado de iu teksto, sekvu jenan formulon: trovu la mezuman kiomon da vortoj en ĉiu paĝo, multobligu ĝin per 60 sekundoj kaj subtrahu la rezulton per la V.P.M. (vortoj per minutoj) dezirata. Supozante, ke iu volas legi je rapido de 360 V.P.M. paĝon kun 540 vortoj, ni venas al jena rezulto: $530 \times 60 : 360 = 83$ s. Tio signifas, ke, sub konstanta lego-rapido de 360 V.P.M., tiu paĝo estos legata en 83 sekundoj. Se oni volos legi je rapido de 600 V.P.M., sufiĉas refari la kalkulon jene: $530 \times 60 : 600 = 53$ s, en kio 53 estas la nova rapido-limo por legi la saman paĝon.

konsultfontoj:

Destri, Luisa, Superinteressante - decembro 2008, p. 106

<http://www.algosobre.com.br/leitura-dinamica>

Privata lernejo adoptas Esperanton

Laŭ informoj senditaj de s-ro Alcyr Guedes, el Taubate Esperanto-Grupo.

Privata lingva lernejo en la urbo Taubaté/SP ofertas al sia kursanaro lecionojn de Esperanto. Pri la iniciato respondecas s-ino Silva Guivard, direktorino de Asocio de Kulturo Brazilo-Usono (ACBEU) en tiu urbo, kiu decidis enkonduki ankaŭ Esperanton apud la tradiciaj angla, germana, franca, itala kaj hispana kursoj.

Asocio de Kulturo Brazilo-Usono (ACBEU) estas prilingva lernejoĉeno kun pluraj enlandaj filioj. Ĝi aktivas jam de 54 jaroj kaj nuntempe estas oficiale rekonata de la usona ambasadejo kiel dunacia centro. La instruprogramo de ACBEU konsistas el pli ol 9 kursoj, inter kiuj du por infanoj kaj unu por instruistoj. Krom ordinaraĵ kursoj, tiu asocio ofertas plurajn kursojn por preparaj internaciaj ekzamenoj, inter kiuj TOEFL-ekzameno (angle, testo de la angla kiel fremda lingvo).

Rua 04 de Março, 477
CEP 12020-270 – Taubaté – SP
(12) 229-3462
ccbeutau@uol.com.br

Gogo la testudo – Martin Weichert



NOVA KURSEJO

Marly Freitas



Claude Piron (1931-2008)

*Svisa psikoterapiisto,
tradukisto, lingvisto, membro
de la Akademio de Esperanto,
verkisto de popularaj verkoj,
kiaj La Bona Lingvo, La Lingva
Defio, Gerda Malaperis! i.a.*



*Marly Freitas, meze sidanta en la unua vico,
ĉirkaŭata de siaj gelernantoj.*

Esperanto-Grupo Claude Piron aperis en 2008 omaĝe al tiu eminenta esperantisto. Estiĝis 2 grupoj de lernantoj, entute 35, kiuj lernis Esperanton per la lernolibro de s-ro Jair Salles, krom videoj kaj aliaj aŭdvidaj rimedoj. En Marto 2009 komenciĝis nova Baza Kurso gvidata de Marly Freitas. La lecionoj okazas unufoje semajne, merkrede. Esperanto-Grupo Claude Piron situas ĉe la strato Anhembí, 197, kvartalo Irajá, Rio de Janeiro, Brazilo. Kontaktu nin per la retpoŝto <marlyfs@terra.com.br>.

Tendaraj Tagoj - kajeroj 2 kaj 3
www.ileibr.org/butiko



Paroligi la lernantojn

Redaktotemo proponita de César Dorneles Soares, el Porto Alegre/RS, kiu afable sendis kelkajn sugestojn, tie ĉi adaptitajn kaj ampleksigitajn de ni.

Kiel ĉiuj bone scias, konversacia aktiveco ekde la komenco de lernigado estas esenca parto de iu ajn kurso de E-o. Jen sugesto por ke vi disvolvu vian konversacian lecionon ĉe viaj lernantoj per maniero pli ludeca kaj amuza.

Materialo bezonata:

kartono, skribilo, sako kaj demando-specimenoj

Preparado:

El la kartono eltondu malgrandajn kartojn kaj sur ili skribu demandojn, kiuj povos instigi la lernantojn paroli pri si mem, sia vivo, siaj ideoj kaj opinioj. Post skribado de la demandoj, konservu la kartojn en la sako. Vidu sekvapaĝe kelkajn demando-sugestojn, kiujn mi prenis el la libro *“Puxa Conversa: 135 perguntas para trocar idéias”* (Parolinstigo: 135 demandoj por interŝanĝo de ideoj), eldonejo Matrix.

Aktivado:

- Kunigu la lernantojn plej komforte kaj pasigu la saketon inter ili, petante, ke ĉiu elprenu unu karton tute hazarde.
- Ĉiu ludanto, laŭvice, laŭtleĝu sian demandon por la ceteraj kunludantoj, kiuj siavice respondos la demandon.
- La ludo finiĝos kiam finiĝos la intereso de la ludantoj.

Sugestoj:

- Laŭnecese adaptu la demandojn al la lingvonivelo de viaj klasanoj aŭ mem elpensu novajn demandojn.
- Ne interrompu la parolantojn por korekti ilin. Dum ili parolas, laŭvole, notu plej gravajn lingvajn erarojn kaj prezentu ilin fine de la ludo,



Demando-specimenoj

Kiu afero igas vin plej plendema?

Kiu estis la plej bela loko, kiun vi jam vidis en la vivo?

Se vi farus tatuaĵon, kia ĝi estus kaj kie sur la korpo ĝi troviĝus?

Kiu estus la vojaĝo de viaj revoj?

Ĉu vi havas iun el la karakterizoj de via astrologia signo?

Se vi povus elekti, kion vi ŝatus vidi de via fenestro?

Kiu estas la plej grava homo ankoraŭ vivanta en la mondo?

Kiu estas via celo por ĉi tiu jaro?

Kiun historian okazaĵon vi ŝatus esti vidinta propraokule?

Pri kio vi plej fieras: pri viaj konkeroj aŭ pri via karaktero?

Ĉu la mondo estos pli bona aŭ pli malbona post cent jaroj?

Se mono ne estus obstaklo, kion vi farus en via vivo?

En kiu alia lando vi ŝatus vivi?

Kion vi ŝanĝus en via personeco?

ne citante nomojn, sed plej diskrete: “dum la ludo, mi aŭskultis tian frazon [...]. Ĉu iu povas montri la eraron kaj korekti ĝin?”

- Ĉar en tia ludo ne estas konkursantoj, sed kunludantoj, la rolo de ludestro tre gravas por ke la ludo daŭru kiel eble plej longe kaj amuze. Se iu ludanto sentas malfacilon memstare paroli, la ludestro intervenu per kromaj demandoj pri la koncerna temo. Foje lernanto ne sukcesas mem aranĝi siajn ideojn per longa paragrafo, sed iom senpene sukcesas respondi mallonge serion da demandoj pri sama temo.

Variaĵo:

Similan kolekton da demando-specimenoj oni trovas en la verketo “*Se... Perguntas para o Jogo da Vida*” (Se... Demandoj por la Vivo-Ludo), de Evelyn McFarlane kaj James Saywell - eld. Ediouro, 1996. En tiu verketo la aŭtoroj kompilis 500 instigajn demandojn, ĉiuj komenciĝantaj per SE...

Malgraŭ la ratifiko de kvar subskribintaj landoj por adopto de la *Ortografia Interkonsento de la Portugala Lingvo*, nur Brazilo validigis la Novan Ortografion, komence de januaro 2009. La dekreto de la Nova Ortografio fariĝas motivo de ŝerco ĉe multaj brazilanoj, kiuj memorigas, ke plej multaj enlandanoj ankoraŭ eĉ ne sukcesas korekte uzi la lingvon laŭ la lasta ortografia reformo! La indigno estas eĉ pli granda, kiam oni legas en gazetaro, ke *“Kaboverdo kaj San-Tomeo kaj Princo prokrastis dum nedefinita tempo la oficialan adopton de la novaj ortografiaj reguloj; Mozambiko kaj Angolo ne ratifikis la Interkonsenton; Orienta Timoro kaj Gvineo-Bisaŭo apenaŭ eksciis pri tiuj novaĵoj kaj Portugalio, ne konsiderante la aferon prioritata, prokrastis sian adaptiĝon al la novaj reguloj por 2014.”*(1)

En Brazilo, la lasta granda lingva reformo okazis en 1971 (vidu en la akompana donaco-kajereto la kronologian tempo-linion de la historio pri reformoj en la portugala). Per ĝi oni draste malpliigis la diferencojn de la ortografioj, sed tio ankoraŭ ne sufiĉis por proksimigi la skribojn de ambaŭ landoj.

Sed kion oni celas per tiu *Ortografia Interkonsento de la Portugala Lingvo*? Laŭ iuj, ĝi solvos la probelmon en la redaktado de dokumentoj, en internaciaj traktatoj, kaj en la publikigo de verkoj de komunaj interesoj. Laŭ aliaj, ĝi proksimigos la ok portugallingvajn landojn per



Angolo



Brazilo



Gvineo-Bisaŭo



Kaboverdo



Mozambiko



Orienta Timoro



Portugalio



San-Tomeo kaj Princo

ununiformigo de la skribo.

El multaj bonintecaj celoj, sendube la plej kurioza estas tiu de la portugalia ministro pri Kulturo, s-ro José António Pinto Ribeiro, kiu vidas en la unuformigo de la ortografio politikan atuton por la lingvo: *“unu el la celoj estas enkonduki la portugalan en la internaciajn organizojn kiel laborlingvon. Tuj kiam ĉiuj membroj de la Komunumo de Portugallingvaj Landoj ratifikos la Ortografian Interkonsenton, ni havos la bezonatajn rimedojn por progresi ĉe UN kaj igi la portugalan unu el ĝiaj laborlingvoj”.*(2)

Se vi mem ankoraŭ havas nenian celon por uzi la novan ortografion, rapidu serĉi iun, ĉar vole nevole ĉiuj devos adaptiĝi al ĝi - almenaŭ ni brazilanoj. Cele iom helpi al vi en tiuj ĥaosaj momentoj, Brazilei pretigis por vi manlibreton pri la nova reformo. Portadu ĝin ĉien, kaj se iu, kulmine de sia indigno, demandos sin ĉu ne estas en la mondo lingvo malbezonanta ortografiajn reformojn, kaptu la okazon por montri ĝin kaj propagandi Esperanton!

“Mi ne scias, kio estas la avantaĝo elspezi milionojn da realoj por adapti la tutan eldonmaterialon, se ĝis nun la diferencoj en la lingvoj (cetere tre malmultaj) neniam malhelpis, ke mi legu iun portugalan verkiston, ekzemple Saramago.”

— Mário • <http://novaortografia.com/o-que-e>

“Oni ja devus forigi el nia vortaro la tiel nomatajn ‘fremdajn vortojn’. La brazilanoj devus iom pli ami sian lingvon, kiel la portugaloj. Kiam mi skribas per komputilo, mi uzas la klavon ‘DELETE’ aŭ ‘DEL’ por formovi iun nedeziratan tekston. Mi ne ‘deletas’.”

— Luiz Braga • <http://novaortografia.com/o-que-e>

(1) <http://blog.estadao.com.br/blog/novaortografia/>

(2) www.culturaemercado.com.br/post/ministros-discutem-acordo-ortografico/

Senpagaj legaĵoj

Gazetejo estas gastejo por retaj esperantaj publikigaĵoj. Ĉiumonate ĉirkaŭ 2000 personoj vizitas le retejon, laŭ informo de ĝia administranto Boris-Antoine Legault. Per tiu reta servo, oni celas 1-e) helpi redaktistojn pli efike disvastigi sian gazeton kaj 2-e) ebligi, ke legantoj facile sciigu pri novaj gazetaj eldonoj en Esperantujo. Nuntempe La Esperanta Gazetejo gastigas 105 gazetojn kun entute 1 623 apartaj retnumeroj — ĉiuj senpage elŝuteblaj. Per abono de RSS-fluoj, oni aŭtomate sciigos pri la plej novaj gazetaj aldonoj. Diskonigu la retejon ĉe viaj lernantoj! La revuo Brazilei gastas tie ĉe la adreso <www.gazetejo/brazilei>.



La praktika proverbaro

*Ordo estas beno
por ĉiu entrepreno.*

Oni jam provis aranĝi la Esperantan Proverbaron plurmaniere (laŭnumere, laŭteme), sed nenia aranĝo estas tiel konvena kaj praktika – almenaŭ por reta konsulto – ol tiu proponata de la angla komputilisto Pejno Simono. La nova ordiga sistemo prezentas la proverbojn organizitaj en rubrikoj laŭ komencliteroj per kio nur gravaj vortoj rolas. Por serĉi ĉiujn proverbojn, kiuj mencias “fiŝon”, Ekzemple, oni iru al la liter-menuo kaj musklaku sur la litero ‘F’. La programo venigos al vi liston de proverboj en kiuj ĉefe rolas vortoj komenciĝantaj per la serĉata litero. Provu mem ĉe <http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/e_prov.htm>.

Konferenco de ILEI

De la 17a ĝis la 25a de julio, esperantistoj kunvenos en la pola urbo Krakovo por partopreni la 42-an Konferencon de ILEI kaj kunfesti ties 60-jariĝan jubileon. La prezidanto de ILEI, s-ro Radojica Petroviĉ, proponante la temon de la konferenco kiel kontribuon al la kongresa temo de UEA, tiel sin esprimas:



“(...) La kongresa temo de UEA kaj la konferenca temo de ILEI por la jaro 2009 indikas multe da komuna enhavo kaj samcela orientiĝo, kvankam ili havas en siaj titoloj eĉ ne unu saman vorton krom “la”. La UK-tema slogano “Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ sintezas en si aktualajn programajn akcentojn de Unesko kaj UN kun la idea esenco kaj praktika valoro de la verko de Zamenhof, omaĝe al lia 150-a naskiĝdatreveno. Dume ILEI koncentras sian atenton al la pedagogiaj aspektoj de la sama temkomplekso omaĝe al sia 60-jariĝo, al la 60-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj al la Internacia Jaro de Interpaciĝo 2009.

“La ILEI-konferenca temo: “La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado” celas enfokusigi du komplementajn taskojn: edukadon al E-o kaj edukadon per E-o. Tio signifas pluvivigon de la E-komunumo per formado de novaj esperantistoj kaj edukadon al la kulturo de paco kaj senperforta solvado de konfliktoj. Tio signifas flegadon de la sentempaj Zamenhofaj idealoj kaj kreadon de fundamentaj ŝtonoj por la paca ponto inter la popoloj.”

Por pliaj informoj, bonvolu viziti la retejon de ILEI ĉe www.ilei.info

Fonto [2008.12.20]: <http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/13005>

Komentoj: Paulo Sérgio Viana

Luiz F. Veríssimo estas modelo de la moderna prozo en Brazilo. Lia stilo estas ĵurnalisma, fulma, trafa, senornama kaj plena je originalaj, kreemaj esprimoj, flanke de ĉiutagaj popolaj parolturnoj. Li kurioze verkas same kiel oni parolas en Brazilo, tamen kun neordinara vigleco. Li kaptas la atenton per humuraj, surprizaj frapoj al la leganto. La nuna proponita teksto por traduko prezentas do tian defion: ni trovu en Esperanto similan bonhumoran, rapidan, trafan kaj naturan tekston, plej proksiman al la parolata lingvo. Oni devas legi ĝin kvazaŭ oni ĝin elparolus dum ordinara babilado.



Luiz F. Veríssimo

Mi elektis kelkajn tiklajn esprimojn:

“Solidários na porta”

“nada menos civilizado que a civilização”

“tentando levar vantagem sobre o outro”

“Antes da roda”

“aí passam por cima”

“É a tua!”

La kandidatoj sufiĉe bone solvis la problemojn. Tamen, unu el la tradukantoj uzis miaopinie iom pezan stilon, kun parolturnoj kaj kunmetaĵoj, kiujn oni ne uzas en la ĉiutaga Esperanto – kvankam gramatike ĝustaj kaj foje eĉ elegantaj. Li tamen uzis “gvidilo” anstataŭ “stirilo”, “transito”, anstataŭ “trafiko”, “kostas kredi” (!), “sinĵetos” anstataŭ “falos”, “animale” anstataŭ “bestece”. Kaj almenaŭ unu akuzativo lia estas dubinda: “super la alian”.

Traduko 2 bone legiĝas, sed ankaŭ ne tute per ordinara lingvaĵo. Kaj lia “kvazaŭ se”, “estiĝo de la rado” kaj “malfermita (anstataŭ “ne [komplete] fermita”, “ne plenfermita”) pordo” iom kompromitis la tuton. Kaj neakceptebla estas lia esprimo “la pordo povos malfermi”.

Tradukinto 3 miaopinie bone sukcesis. Li uzis naturan, fluan, vivecan, viglan Esperanton, kiu plej proksimiĝas al la originalo. El lia traduko oni facile kaptas ĝian spiriton. “Antes da roda” li trafe faciligis al la leganto: “antaŭ la invento de la rado”. “Porta aberta”, iom pli ĝuste: “pordo neŝlosita”. Kaj la malfacila esprimo “é a tua!”, kiu en la portugala lingvo estas memkomprenebla, sed eble ne internacie (se oni tradukas laŭlitere), fariĝis, belege: “la via estas tia!”. Mia sola hezito rilate lian bonegan tekston estas la esprimo “li luktas kun sia proksimulo”; mi preferus: “li luktas kontraŭ sia proksimulo”.

Koncerne la esprimon “*Uma pequena clareira de solidariedade na jângal*”, ĝi permesas du solvojn, kaj la elekto estas tute persona: eksplika kaj metafora tradukoj, kiel faris la tradukinto 3. Kurioze, la metafora solvo estas pli laŭlitera!”

Gratulon!

La elektitan tradukon sendis **José Mauro Progiante** el la urbo Bauru/SP, kie li partoprenas en la loka esperanta movado, ĉefe kiel kursgvidanto ĉe Esperanto-Societo de Bauru. Profesie li estas fiskinspektoro, universitata instruisto pri juro kaj preleganto. Kiel libro-premion, li elektis la verketon *Geedza Kazono* - Eld. Oportuno, San-Paŭlo, 2008 - rakontaron de Machado de Assis, tradukitan de Paulo Sergio Viana.



Premiita tradukaĵo:

PORDA SOLIDARECO

Ni travivas la civilizacion de la aŭtomobilo, sed malantaŭ stirilo homo kondukas kvazaŭ li ankoraŭ vivus en kavernoj, antaŭ la invento de la rado. Kvazaŭ la stratspaco estus la lasta mamuto, por ĝi li luktas kun sia proksimulo, per taktikoj similaj al tiuj praaj, sed nur hupante anstataŭ grumbli, aŭ grumblante anstataŭ mordi.

En ĉiu granda urbo de la mondo, la trafiko estas metaforo de nia konkurplena vivo. En sia propra metala mondeto, ĉiu penas havi avantaĝon super la alia aŭ almenaŭ eviti, ke la alia lin timigu. Kaj tiel oni pravas, ke ekzistas nenio malpli civilizita, ol la civilizacio.

Tamen estas escepto. Estas malgranda solidareca senarba areo en tia ĝangalo: la neŝlosita pordo. Kiam la flankiranta aŭtomobilo apudiĝas al la via kaj iu elmetas sian kapon, vi prepariĝas por la plejmalbono. Pretas via respondo: “La via estas tia!” Sed vi povas havi surprizon.

— Pordo neŝlosita!

— Kio?

Estas malfacile al vi kredi, ke nek vi, nek iu el via familio estas insultata. Ne, la malamiko sincere zorgas, ke la pordo ne malfermiĝu kaj vi falu el la aŭtomobilo. La neŝlosita pordo estigas specon de neesprimita batalhalto. Ĉiuj ĝin fingromontras, kaj vin persekutas, ekscite hupante, se hazarde vi ne aŭdis la unuan averton. “Pordo neŝlosita!” Ŝajnas, ke tio estas honorkodo, intertempo inter malpacoj. Se la pordo malfermiĝos kaj vi ja falos surstraten, tiam oni surveturos vin. Jes, sed oni estos avertinta vin.

Konklude, ni ankoraŭ ne revenis al la besta rango.

VERÍSSIMO, Luís Fernando. *La memmortiginto kaj la komputilo*.
Porto Alegre, L&PM, 1992.

Traduku la ĉi-suban elprenaĵon kaj sendu vian tekston rete al revuo@ileibr.org aŭ poŝte al la adreso de la redaktejo (vidu en la kolofono) plej malfrue ĝis la 30-a de majo 2009. La plej bona traduko-solvo gajnos libro-premion.

[O Sangue aduba a terra]

Mas diante deles, parabélum na mão, o rosto contraído de raiva, está Juca Badaró. Também ele estava ante a mata, também ele viu os raios e ouviu os trovões, escutou o miado das onças e o silvo das cobras, também seu coração se apertou com o grito agourento do corujão. Também ele sabia que ali moravam as assombrações. Mas Juca Badaró não via na sua frente a mata, o princípio do mundo. Seus olhos estavam cheios de outra visão. Via aquela terra negra, a melhor terra do mundo para o plantio de cacau. Via na sua frente não mais a mata iluminada pelos raios, cheia de estranhas vozes, enredada de cipós, fechada nas árvores centenárias, habitada de animais ferozes e assombrações. Via o campo cultivado de cacauzeiros, as árvores dos frutos de ouro regularmente plantadas, os cocos maduros, amarelos. Via as roças de cacau se estendendo na terra onde antes fora a mata. Era belo. Nada mais belo no mundo que as roças de cacau. Juca Badaró, diante da mata misteriosa, sorria. Em breve ali seriam os cacauzeiros, carregados em frutos, uma doce sombra sobre o solo. Nem via os homens com medo, recuando.

Quando os viu, só teve tempo de correr na sua frente, se postar na entrada do caminho de parabélum na mão, uma decisão no olhar:

— Meto bala no primeiro que der um passo...

Jorge Amado - *Terras do sem-fim*, Martins Editora, 1943.

Komunikado en EU kaj UEA

Kiom kostas tradukservoj en tiuj du organizoj?

Komparu sube la informojn, kompilitajn de Dan Van Herpe, kies tekston el la nederlanda tradukis kaj sendis: Germain Pirlot <gepir@hotmail.com>.

	Plena kunsido en Eŭropa Parlamento	Universala E-Kongreso en Roterdamo (2008)
anoj/partoprenantoj	785	± 2000
ŝtatoj/landoj	27	± 60
Laborlingvoj	23	1
Tradukistoj	700	0
Interpretistoj	800 => 1000	0
traduk-kostoj	800 mil € (*)	0,0 €

Kial la elito ne kapablas fari kion faras la normala civitano ?


Se ĉiujare E.U. dediĉus onon de tiu sumo al la instruado de Esperanto, ne estus nur 785 eŭropaj parlamentanoj, sed 500 milionoj da eŭropaj civitanoj, kiuj povus interkomuniki sen interpretistoj, de homo al homo, en reciproka respekto de la lingvo kaj de la kulturo de ĉiuj.

Dan Van Herpe

(*) Monsumo foruzita de EU-institucioj, nur en 2006, por traduko-servoj.

Fonto: <http://blog.seniorennet.be/taaldemocratie/archief.php?startdatum=1234134000&stopdatum=1234738800> (12/02/2009)

... kaj Esperanto en la lernejo.





ZAMENHOF A JARO



D-ro L. L. Zamenhof
(1859 - 1917)

La kreinto de Esperanto havas
interesan historion por rakonti
okaze de la 150-jara jubileo
de sia naskiĝtago...

... kaj vi havos la tutan jaron 2009 por
rerakonti ĝin al viaj lernantoj!